

BRAZILA ESPERANTISTO

67-a Jaro

MAJO - AUGUSTO 1973

N.º 710-713

Oficiala organo de **Brazila Esperanto-Ligo**, Societo de publika utileco (dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921). Jarabono eksterlande: 15 respondkuponoj.

Sidejo: **Praça da República, 54, 2.º** — Telefono: 232-6309 — RIO DE JANEIRO — BRAZIL
Respondeca redaktoro (redactor principal): **D-ro Carlos Domingues**



Irani Baggi de Araujo

KONVERSACIO (XII)

SAKRAMENTOJ

— Nu, bone, mia filo jam estas kristano, baptita en la nomo de l'Patro kaj de l'Filo kaj de l'Sankta Spirito. Pastro Johano baptis lin Karlo.

— Kie?

— En la baptejo de la diocezo Kate-dralo. Mia frato Alberto kaj bofratino Alico tenis la bebon antaŭ la baptojuo.

— Do Alberto fariĝis lia baptopatro, kaj Alico, la baptopatrino.

— Jes. Karlo estas ilia baptifilo. Krome Alberto estas de nun baptano de Alico, kaj ŝi, lia baptanino.

— La baptopatrino de via filo estas ankoraŭ tre juna knabino!

— La dua sakramento, kiun oni ricevas, estas Eŭkaristio.

— La unua komuniĝo estas rito tre delikata, neforgesebla!

— Konfirmacio estas la tria sakramento; nur episkopoj povas ĝin doni.

— Poste venas... edziĝo...

— Viro kaj virino unuiĝas, ĝis morto ilin disigas...

— Ne nur morto; ankaŭ eksedziĝo.

— En Brazilo la Konstitucio ne agnoskas divorcon, tamen la juĝisto povas doni separon. Simpla forlaso estas kontraŭleĝa. Ĉe antikvaj hebreoj estis alia formo de eksedziĝo: la repudio.

— Al divorcino aŭ separatino la eksedzo devige pagas alimenton.

— Mi kaj Heleno konatiĝis kaj enamiĝis frue, en la lernejo. Ni amindumis longan tempon, ĝis kiam mi petis ŝin kiel edzinon, kaj ni fianĉumis du jarojn. Post la nupto ni forvojaĝis al Guarapari por la mielluno.

— Kaj la du estas ĉiam p'li kaj pli feliĉaj! Ne forgesu, ke mi estis via edzigeŝtato.

— Per la sakramento de la konfeso, kaj koncerna pentofaro, oni redonas pacon al sia konscienco post mortiga peko.

— Ordinado estas nur por konsekri la sacerdotojn kaj aliajn ekleziulojn.

— Fine estas la sanktoleado, por ke ni akceptu la morton sen timo, kun la espero bone sukcesi ĉe la Lasta Juĝo...

— Mi ankoraŭ ne scias, kiam mi ĝin bezonos!

G. P.

QUOTA ANUAL DE ADESAO A LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

Cr\$

M 1 — além das vantagens de sócio, recebe a carteira e o *Brazila Esperantisto* 35,00

M 2 — recebe o mesmo que o M 1. Paga uma quota mais alta para auxiliar a B.E.L. e o movimento ...-..... 50,00

Essas quotas correspondem ao ano civil.

Taxas dos Cursos

Curso Elementar — Contribuição única: 120,00
50% desse valor deverá ser remetido com o pedido de inscrição; o restante, com a remessa da 6.^a lição.

Curso Superior — Contribuição única: 200,00
50% desse valor deverá ser remetido com o pedido de inscrição; o restante, com a remessa da 10.^a lição.

Curso Magistral — Contribuição única: 300,00
50% desse valor deverá ser remetido com o pedido de inscrição; o restante, com a remessa da 15.^a lição.

Todas as importâncias devem ser remetidas em cheque pagável no Rio de Janeiro à

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO
PRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 2.º
Rio de Janeiro, GB

Traduções magistrais de Porto Carreiro Neto:

Cr\$

— Enkonduko en la studadon de la Spiritismo Doktrino, *Allan Kardec* 6,00

— La Libro de la Spiritoj, *Allan Kardec* (enc.) 30,00

— Ago kaj Reago, *Francisco Cândido Xavier* 18,00

— Paulo kaj Stefano, *F.C. Xavier* 30,00

— Nia Hejmo, *F.C. Xavier* 18,00

— En Ombro kaj en Lumo, *Zilda Gama* 15,00

— La Libro de la Mediumoj, *Allan Kardec* 25,00

Irani Baggi de Araujo

1891 — 1973

Ŝi estis la plej diligenta estrarano de nia Asocio. Ĉiutage, frumatene, posttagmeze aŭ vespere, se necese; dum la tuta semajno, sabate aŭ dimanĉe, se bezonate; ŝi ĉiam estis preta labori, kunlabori, prilabori, porlabori. La movado estis por ŝi ŝia spirado.

Kaj la movado profitis el ŝia sperto. Laborante kaj cerbumante ŝi kontrolis nian kason kun tia zorgo, kian havas nia Ministro pri Financoj. La buĝeton ŝi ekvilibrigis per sia akurata administrado. Serene, konstante, energie ŝi gvidis la estraranojn en nia mona mondeto.

Sed ne nur pri mono ŝi spertis. Samrangan kompetentecon ŝi elmontris sur la kampo de sekretariaj helplaboroj. Ŝi maŝinskribis ĉiujn tekstojn; ŝi legis ĉiujn leterojn; ŝi prizorgis pri ĉiuj arkivoj, Biblioteko kaj Libro-Servo.

Ĉu tiu estis ŝia nura laboro? Se jese, ĝi estus pli ol sufiĉa. Tamen ŝi plie trovis tempon por literaturaj paŝoj. Multon el la brazila beletro ŝi tradukis, ĉiam kaŝante sian memon sub anonimeco aŭ pseŭdonimo. Ŝi tradukis Esperanten, interalie, "Pas-sionária", de Coelho Neto, "Os Mo-nhos", de Luiz Guimares Filho, kaj parton de "O Mistério", publikigitan en *Brazila Esperantisto*.

Krom la portugalan lingvon kaj Esperanton ŝi scipovis la francan kaj hispanan.

Nia kasistino estis antaŭ ol ĉio lojala. Por ŝi la movado estis kvazaŭ unusola filo, kiun ŝi ne havis. Multfoje — por ne diri ĉiam — ŝi flanken metis ĉiun fremdan entreprenon por sin dediĉi korpe kaj spirite al la sankta laboro: helpi al la disvastigo de la genia kreaĵo de Zamenhof. Pro sia emeritigo post multjara laborado en National City Bank ŝi ĝojis, ĉar tiam ŝi povis sin tute dediĉi al Esperanto. La movado ŝuldas al ŝi ŝian tutan vivon.

Irani Baggi de Araujo mortis sen gloro kaj pompo. Sed ŝia animo daŭre restas ĉe ni; ŝia milda mieno persiste ridetas al ni, disdonante apogon; ŝia koro elŝprucigas varmon tra la ĉambrojn de Brazila Esperanto-Ligo, kie ŝi servis dum la vivo per efika agado, kaj servas post la morto per sia kara memoro. Prave diras unu el niaj sekretarioj, ke "en ĉiu tirkesto estas io de F-ino Irani".

* * *

Irani Baggi de Araujo naskiĝis en Petrópolis, Rio de Janeiro, en la 5-a de Aŭgusto 1891 kaj mortis en Guanabara en la 12-a de Februaro de la kuranta jaro.

Ŝia patro, D-ro Jácome Martins Baggi de Araujo, Supera Juĝisto en

BRAZILA KRONIKO

PERNAMBUCO

Recife — S-ro Amaro Pinangé Soares sendis al B.E.L. longan raporton pri la lastatempa agado de Associação Pernambucana de Esperanto. La informado kaj varbado de novaj anoj estas la ĉefa agado. Por la elementa kurso de Esperanto oni uzas la bonan verkon "Esperanto em 20 Lições" de A. Couto Fernandes kaj H. Mota Mendes. Jen la nova adreso de A.P.E.: Rua Siqueira Campos, 279/905.

MINAS GERAIS

Belo Horizonte — Gen. Geraldo Pádua, vicprezidanto de Esperanto-Societo de Minas Gerais, informas, ke ĉiudimanche radiamatoroj el Maceió, Caruaru, Salvador, Fortaleza kaj Belo Horizonte konversacias en Esperanto dum pli ol unu horo.

Estas menciinde ke la *Konversacio IX* publikigita en *Brazila Esperantisto* n-ro Jul/Sept. 1972, estas dediĉita al tiuj radiamatoroj el la Nordoriento.

Uberaba — Laŭ informo de Luiz Anacleto Silos, S-ino Maria Júlia Junqueira Rodrigues da Cunha, instruas Esperanton al infanoj ĉe "Lar Espirita" en sia urbo. Por plivastigi sian laboron ŝi intencas aranĝi esperanto-grupeton.

Ŝtato Rio de Janeiro, estis la unua brazilano disvastiganta Esperanton en nia lando.

Junaĝa F-ino Irani fariĝis esperantistino kaj frue sin dediĉis al la movado, unue en la prezidanteco de D-ro Alberto Couto Fernandes kaj poste en tiu de la nuna prezidanto.

Ŝi okupis elstaran lokon en la iama Virina Klubo, en B.K.E. kaj en la estraro de B.E.L. kie ŝi okupis la postenon de sekretario kaj, ekde 1947, tiun de kasisto.

SÃO PAULO

Monte Aprazível — Same kiel okazis en la pasinta jaro, Instituto de Educação Estadual "Capitão Porfírio de Alcântara Pimentel" funkciigas, kiel nedevigan lernobjekton, esperantokurson sub la gvido de Profesoro Benedito Silva. La kurso okazas en du klasoj, unu el ili celanta tiujn, kiuj finis la kurson en la pasinta jaro.

São Miguel Paulista — En Aprilo lasta estis elektita kaj enofigita nova estraro de Esperanta Klubo "Zamenhof", nome: Prez: D-ro Osvaldo Pires de Holanda; Vicprez.: D-ro Darmy Mendonça; Gen. Sek.: Hérito da Silva Almeida; Unua Sek.: Sérgio de Jesus Lopes; Dua Sek.: Humberto Noronha da Silva; Unua Kas.: Carlindo Pereira Leite; Dua Kas.: Antonio Radica; Bibliot.: Sebastião Palmeira Júnior; Propag. Direktoro: Sebastião Cardoso Júnior; Konsilantoj: Oscar Moreira Barros, José Sebastião de Souza kaj Antonio Luis Cardoso. En la okazo, la klubo festis la konkludon de sia propra sidejo ĉe Rua Idioma Esperanto, 17.

Caçapava — En la 1-a de Januaro de la kuranta jaro, pere de Rádio Difusora de Taubaté, Maj. G. A. Silva Velho faris prelegon pri la esperanto-movado en Brazilo kaj eksterlando. La disaŭdiĝo okazis en informprogramo kiu, laŭdire, havas grandnombran ĉiutagan aŭskultantaron.

RIO GRANDE DO SUL

Rio Grande — Nia samideano Dirceu Porciúncula sendis al ni ekzempleron de la gazeto *Papareia* (Sabloglutanto) kun favora artikolo de D-ro Newton Azevedo, fama loka kuracisto, simpatianto de nia lingvo.

En la artikolo D-ro N. Azevedo faras precisan skizon de la brazila esperantomovado ekde 1906.

Guarulhos — De la 11-a de Marto lasta Rádio Difusora de Guarulhos dissendas ĉiudimanche Esperanto-programon. La inaŭguron ĉeestis S-ro Nelson Silveira prez. de Associação Paulista de

daŭrigota

APERFEIÇOE O SEU CONHECIMENTO

Komparu vian tradukon kun la nia, kaj eltiru instruon per esploro de la diferencoj.

TEREZA BATISTA

Jorge Amado

— Vi estas la dommastrino; ne forgesu tion. Ne povas vivi malpura, malzorga, malbone vestita. Mi volas vidi vin bela... Ja, eĉ malpura kaj kovrita de ĉifonoj, vi estas bela, sed mi volas vian belecon elstarigita, mi volas vidi vin pura, eleganta, vera sinjorino. — Li ripetis: — vera sinjorino.

Sinjorino? Ha! tio mi neniam estos... — pensas Tereza, aŭdante lin, kaj la doktoro ŝajne legas ŝian penson kvazaŭ li havas la donon de divenado.

— Vi nur ne estos tio, se vi ne volos, ne havos volforton. Se vi ne estas tia, kia mi pensas, ke vi estas.

— Mi penos...

— Ne, Tereza, peni ne sufiĉas.

Tereza fiksrigardis lin, kaj Emiliano vidis en ŝiaj okuloj la brilegon de diamanto:

— Mi ne scias bone, kiel oni estas sinjorino, sed malpura kaj vestita per ĉifonoj vi neniam plu min vidos. Estu certa.

— Rilate al la servistino, kiu lasis vin labori, dum ŝi neniofaris, mi maldungos ŝin...

— Sed ŝi ne kulpas; mi mem volis fari la taskojn; mi estas kutiminta kaj ne povis ne fari...

— Eĉ sen kulpo, ŝi ne plu taŭgas; al ŝi vi neniam plu estos la mastrino; vidinte vin kvazaŭ servistinon, ŝi jam ne havos respekton al vi. Mi volas, ke ĉiuj respektu vin; ĉi tie vi estas la dommastrino, kaj super vi nur mi kaj neniu alia mastras.

Elportugaligis G.P.

Esperanto. Kunlaboris en la informaparto D-ro Waldir Lisboa Rocha kaj Maj. Gilberto A. Silva Velho. La novaĵoj estis ĉerpitaj el *Brazila Esperantisto* kaj *Heroldo de Esperanto*.

RECENZO

Ivo Andrić — SONGO KAJ MALDORMO SUB LA KARPENETO — Noveloj tradukitaj el la serba lingvo de Imbert Roger kaj Tišibar Zlatko — Eld. Internacia Kultura Servo, Zagreb, 1972 — 80 paĝoj — 17 cm x 12 cm.

Entute ili estas 13 rakontoj, zorge tradukitaj. Eĉ ne konante la originalon, ni "sentas", se ne la fidelecon, almenaŭ ian fluan, simplan, tamen trafan prikribon de la faktoj kaj personoj. La tuta legado estas agrabla, ne laciga kaj senpaŭza.

"Ivo Andrić: San I Java Pod Grabićem" estas la sola pli ampleksa prozverko el jugoslavia literaturo aperinta post la dua mondmilito. Tio igas ĝin pli interesa, des pli ke, ĝi situacias en la periodo de aŭstro-hungara okupado.

Ergoto — LAŬTEMA VORTARO Esperanto, angla, franca, hispana. Kompilado: Magistro Adán Hryniewicz. Angla- Esperanta kontrolado: Lic. Cecil D.A. Capp; Franca-Esperanta kontrolado: S-ro André Lefillastre. Eldono de la kompilinto. 1972.

Kun plezuro ni finlegis la verkon "*Laŭtema Vortaro*" de Mag. Adán Hryniewicz, ĉar de longe ni atendas tian verkon por la ĉiutaga uzado; ni kredas, ke multaj esperantistoj havos ĝin sub la mano.

La verko konsistas el grupigo de laŭtemaj vortoj kun traduko en la anglan, francan kaj hispanan lingvojn.

Ĝi ja estas bona helpilo en la elementaj aŭ konversaciaj kursoj, por kursgvidantoj kaj lernantoj; en la ordinara vivo, en vojaĝoj, fine en multaj aliaj cirkonstancoj, kiam ni ne ekmemoras pri vortoj, kiujn ni delonge ne uzas.

Por la kompilado oni povas elekti aliajn planojn, ĉiuj egale bonaj laŭ subjektiva vidpunkto.

Rilate al mankoj aŭ misaĵoj la kompilinto estas kompetenta kaj korektos ilin en la plej proksima eldono. Ni ne forgesu, ke "nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras."

Bibliografio

LA TUTA ESPERANTO. *Henrik Sepik.* Redakto: Kunco Válev. Korekto: Ivan Sarafov. Eldono: Sofia Distrikta-Urba Komitato de B.E.A. Liveras: Bulgara Esperantista Kooperativo. 1971.

Ĝi estas nova eldono de bona gramatiko delonge elcerpita. La verko estas destinita al tiuj, kiuj jam vizitis elementan kurson kaj deziras perfektigi sin kaj "penetri profunden en la organismon de la lingvo".

* * *

BONHUMORA INJEKTILO. *Ergoto de Bonaero.* 120 spritaj dialogoj kaj amuzaj anekdotoj. Kovrilbildo de la aŭtoro. Eldono de la aŭtoro. 1973.

En la enkonduko la aŭtoro klarigas, ke "Homo bezonas de temp'al tempo injekton da bonhumoro; tiucele mi provizas — per ĉi tiu libro — ilon, kies akrepinĝa "pinglo" tute sendolore enŝprucigos al vi, ŝatata leganto, gajhumoran dozon, dank'al kiu vi forgesos ĉiajn zorgojn. Elprofitu do ĉi tiun amuzan injektaĵon."

* * *

LA KRIMO DE L'MILITO. Johano Baŭtisto Alberdo. El la hispana tradukis *Ergoto de Bonaero.* Kovrilbildo de la tradukinto. Eldono: Argentina Esperanto-Instituto 1973.

Eseo de Johano Baŭtisto Alberdo, argentina verkisto kaj aŭtoro de politikaj, juraj kaj historiaj verkoj, mortinta en 1884.

Per tiu ĉi verko la leganto povas konstati, ke jam en 1869, fama argentina verkisto, kiel Zamenhof, antaŭvidis estontan bildon pri mondo kie la tuta homaro pace kunvivis en plena frateco.

* * *

MONOSILABOJ. *Diderto Freto.* 2-a Volumo. Sonetoj kun monosilabaj versoj. Eldono de la aŭtoro.

Kiel klarigas la aŭtoro *Monosilabaj*, laŭ la formo, estas sonetoj kun monosilabaj versoj, sen verboj, sen adjektivoj kaj sen akuzativoj. Laŭ la formo kaj enhavo, ili estas la plej sinteza poezio, kin aperis ĝis nun en la monda literaturo."

NEKROLOGO

ANDREO VILAFRANCA

En Julio de la pasinta jaro mortis la argentina samideano Andreo Villafranca, en la ago 82-jara.

Estante aktiva esperantisto, li sindone apogis ĉiujn kampanjojn por disvastigo de la internacia lingvo. Li tre simpatiis al la brazila movado kaj ceestis kelkajn ĉi-tieajn kongresojn.

OSCAR MOREIRA BARROS

La 16-an de Aprilo lasta forpasis, en São Miguel Paulista, Stato São Paulo, s-ro Oscar Moreira Barros, aktiva esperantisto en tiu urbo. La mortinto estis vigla membro de Esperanta Klubo "Zamenhof".

ESPERANTO NO ESTRANGEIRO

ESTADOS UNIDOS — No âmbito do 57.º Congresso Universal de Esperanto, realizado em Portland, a língua internacional foi usada pela primeira vez na aplicação de testes de inteligência. Os candidatos habilitados passam a ser sócios das organizações *Mensa* e *Espermenso*. *Mensa* (Box 1322 North P.O., Halifax, N.S. Canadá) é uma associação que congrega indivíduos com QI superior ao de 98% das pessoas comuns. *Espermenso* é uma seção de *Mensa*, com objetivo de divulgar o Esperanto na organização.

HOLANDA — 2103 pessoas participaram do Curso de Esperanto transmitido a cores pela emissora de televisão "Teleac". 145 fizeram o exame final, dos quais foram aprovados 143.

INGLATERRA — Bernard Cavanagh assumiu a cátedra de Esperanto da Universidade de Liverpool. O Dr. Cavanagh é autor da brochura "A first foreign language for all mankind", sobre o Esperanto.

ITÁLIA — O Padre Jorge J. Korytkowski, jovem capuchinho, apresentou na Universidade Pontifícia de Roma uma tese escrita em Esperanto. Título da tese: "O ecumenismo na temática lingüística internacional".

IUGOSLÁVIA — No dia 20 de janeiro p.p. casaram-se em Sarajev, o engenheiro eletrotécnico Miro Hadjihasanović, esloveno, e a senhorita Assuncion Ferrer Hervas, estudante espanhola. Conheceram-se em 1970, durante o 55.º Congresso Universal de Esperanto, em Viena.

PORTUGAL — Após a suspensão do cerceamento do ensino do Esperanto em Portugal, fundou-se, em março, a Associação Portuguesa de Esperanto. Sede: Costa do Castelo, 70, 1.º, Lisboa 2.

24-9-72, 26-11-72, artigos de G. Villas Boas Passos.

Jornal do Comércio, Recife, 10-4-73, 14-4-73, 15-4-73, 29-4-73.

Diário da Noite, Recife, 27-3-73.

Diário de Pernambuco, Recife, 14 a 16-4-73.

Reformador, órgão da F.E.B., RJ, jan. 73.

ESPERANTO NA IMPRENSA DO BRASIL

Publicaram notas ou informações em ou sobre o Esperanto os seguintes periódicos:

A Candeia, ano XII, n.º 56, Órgão da Frente de Renascimento Espiritual Lucis, Brasília.

A Tribuna, Taubaté, SP, 25-10-72, 20-12-72, 23-12-72, 9-2-73, 23-2-73, 7-4-73.

Matutino Popular, Caçapava, SP, 21-1-73, 13-2-73, 13-3-73, 27-3-73, 14-4-73.

Diário de Notícias, Porto Alegre, 29-4-73. Artigo de M. Belmonte de Abreu.

A Cidade, Ribeirão Preto, SP, 18-10-72.

A Notícia, Campos, RJ, 19-11-72.

O Guia, órgão escoteiro, ano V, n.º 12, ano VI, n.ºs 1 e 2.

Correio do Povo, Porto Alegre, 11-11-72 e 1-3-73, art. M. Belmonte de Abreu.

A Tribuna, Santos, SP, 24-9-72, 12-11-72, 3-12-72, 9-3-73, arts. F. S. Almada.

O Jacaré, Jacareí, SP, 24-10-72, art. G. A. Silva Velho.

O Dia, RJ, 10-12-72, 11-12-72.

A Gazeta, Vitória, 16-7-72, 30-7-72, 6-8-72, 13-8-72, 20-8-72, 27-8-72,

LAŬDO PRI "POR VIA SLIPARA VORTARO"

"Boletín", órgano de Hispana Esperanto-Federacio, mencias en sia n-ro 59 (195), de Jan/Feb 73, la verkon de nia Vicprezidanto, Generalo Geraldo Pádua — "Por Via Slipara Vortaro" —, aperanta en B.E.

La priresponda artikolisto, F. de Diego, gratulas la aŭtoron kaj asertas, ke "lia impona verko, frukto de multjara, ama kaj konscienca laboro, estas sekveda ekzemplo por niaj vortaristoj".

B.E. dankas, en la nomo de Geraldo Pádua, la favoran mencion en la ŝatata kaj leginda kroniko.

BRAZILA LITERATURO EN ĈEHOSLOVAKA REVUO

Javisko, neesperanta belarta revuo eldonata en Ĉeĥoslovakio, publikigis en la numero de Novembro-72, tri poeziaĵojn de brazilaj poetoj, tradukitajn de Sylla Chaves, nome: "Hino", de J.G. de Araújo Jorge, "As Pombas", de Raimundo Correia, kaj "Luar do Sertão", de Catulo da Paixão Cearense.

Por la publikigo peris S-ro Nelson Silveira, Prezidando de São Paulo Esperanto-Asocio.

Laŭdire, unuafoje la ĉeĥoslovakoj kontaktis kun la brazila literaturo pere de tiu eldonaĵo.

La poeziaĵoj aperis en Esperanto.

ESPERANTA PORTUGALA PROVERBARO

L. L. Zamenhof — A. Couto Fernandes

Coleção de provérbios correspondentes em Esperanto e Português.

Classificados em 222 grupos, com índice alfabético nas duas línguas.

121. MALPERMESO

Frukto malpermesita estas plej bona. Kion lego malpermesas, tio plaĉas ne ĉesas.

A obra é completada pela peça de Artur Azevedo "Amor por Anexis" com texto bilingue (trad. de A.C. Fernandes)

AGNESO (sidigante). — Dio liberigu min de tia edzo!

IZAIO — Kiu nenion valoras, plej multe sin glorias... (ankaŭ sidigas).

121. PROIBIÇÃO

O proibido é desejado. A fruta proibida é a mais apetecida. É da proibição, que nasce a tentação.

INÊS (sentando-se) — Deus me livre de semelhante marido!

ISAÍAS — Presunção e água benta cada qual toma a que quer... (senta-se também).

14,5 x 19 cm, 168 pág. Cr\$ 8,00

KATALOGO DE ELEKTITAJ LIBROJ EN ESPERANTO

Livro ilustrado, interessante para leitura e muito próprio para presente e propaganda.

Documento valioso para prova da vitalidade do Esperanto e de sua literatura Cr\$ 5,00

PLENA ILUSTRITA VORTARO DE ESPERANTO

Redigido sob a direção de G. Waringhien, presidente da ACADEMIA DE ESPERANTO, com a colaboração de esperantistas especialistas em linguística, literatura, ciência e técnica. Formato: 15 X 21 cm. 1344 páginas

Em comparação com o conhecido PLENA VORTARO: progresso quantitativo e qualitativo.

Preço Cr\$ 200,00

RUI BARBOSA

Biografia Eseo

Fernando Nery. Trad. em Esperanto de J. Joels. Esperanto modelar, elogiado pela crítica mundial. Dados biográficos. Transcrição de textos escolhidos do imortal jurista e político.

Obra valiosa dos pontos de vista linguístico, jurídico e histórico.

15,5 x 23 cm, 290 pág. . Cr\$ 10,00

LA NOBLA KORANO

Texto paralelo em árabe e em Esperanto Cr\$ 112,00

ANONCETO

Mi deziras korespondi kun tuta mondo kaj kolektas ĉiujn esperantaĵojn, precipe glumarkojn. Respondo garantiata. Mi bone rekompencos je via deziro. Richard Wluka, D-3 Hannover-Leinhausen, Bremer Str 8, Germanujo.

- ALMEJAR — 1. *Strebi* fariĝi riĉa. 2. *Avidi* (deziri ekposedi) riĉaĵojn.
- ALMIRANTE — *Admiralo*; ĉefadmiralo; vicadmiralo; subadmiralo.
- ALMISCAR — *Mosko*.
- ALMOÇAR — *Tagmanĝi*.
- ALMOÇO — *Preni tagmanĝon*.
- ALMOFAÇAR — *Strigli la ĉevalon*.
- ALMOFADA — 1. *Kuseno*; seĝkuseno; sidkuseno de aŭto. 2. *Stampilkuseneto*; *kuseneto* por pingloj.
- ALMOFADINHA (ĵar.) — *Danda* junulo; la *dandoj*.
- ALMOFAZ — *Pulvorigi en pistujo*.
- ALMÔNDEGA — *Viandbuleto*; *buleto* (vianda).
- ALMOTACEL — *Skabeno* (funkciulo).
- ALMOTOLIA — *Lubriki per oleilo*.
- ALMOXARIFADO — *Provizajo de la regimento*.
- ALMOXARIFE — *Provizisto de regimento*, fabriko, konstruo.
- ALNO — *Alno* (Bot. "alnus").
- A LÓ — 1. *Lofi la ŝipon*. 2. *Teron alventflanke!*
- ALŌ — 1. *Hola!* (veki atenton). 2. *Lo, ha lo!* (voki telefone).
- ALOCÁSIA — *Alokazio* (Bot. "alocasia").
- ALODIAL — *Feŭda*, tenura kaj *aloda* poseda.
- ALÓDIO — *Havi alodon* pri bieno; la *alodaĵo*.
- ALOÉS — *Aloo* (Bot. "aloe").
- ALOFONE — *Alofono* (Gram.).
- ALOJAMENTO — 1. *Mendi*, okupi *loĝejon*; *loĝiĝo* ĉe amiko; *loĝado* en du persona ĉambro; *loĝiga* servo. 2. *Kamero* de sidvalvo; *kuŝejo* de risorto; *bomborako*.
- ALOJAR — 1. *Loĝigi* amikon ĉe si; *loĝiĝi*, enloĝiĝi ĉe amiko, en pensio.
- ALONGA — *Alonĝo* de vitra balono.
- ALONGAR — *Piloniigi* la jupon.
- ALOPATA — *Alopata* kuracisto; *alopato*.
- ALOPATIA — *Homeopatio* kaj *alopatio*.
- ALOPECIA — *Alopecio* (senhariĝo).
- ALOPECURA — *Alopekuro* (Bot. "alopecurus").
- ALOTROFIA — *Alotrofio* (Med.).
- ALOTROPIA — *Alotropio* de kristaloj.
- ALOTRÓPICO — *Fosforo estas alotropa* (du aŭ pli kristalformoj).
- ALPACA — *Alpako* (Zoo. "lama pacos").
- ALPENDRE — *Korbelo* (elstara pendants konstruaĵo).
- ALPERCATA — *Surmeti*, porti, demeti sandalojn.
- ALPINISMO — *Fari alpinismon*, *montgrimpadon*.
- ALPINISTA — *Alpinisto*, *montgrimpisto*; la *montgrimpantojn*.
- ALPINO — 1. *La alpa regiono*. 2. *La alpino* (log. sur Alpoj.).
- ALPISTE — *Falaro* (Bot. "phalaris canariensis").
- ALQUEIRE — 1. *Buŝelo* (angla, 36,5 l; franca, 10 l.) 2. *Buŝelo* (areo, sur kiu oni plantas buŝelon da greno) da tero.
- ALQUEIVE — *Senkultivejo*.
- ALQUEMIA — *Alĥemio*; *alkemio*.
- ALQUEMILA — *Alkemilo* (Bot. "alchemilla").
- ALQUEMISTA — *Alĥemisto*, *alkemisto*.
- ALQUEQUENJE — *Alkekengo* (Bot. "physalis alkekengi").
- ALSACIANO — 1. *La alsaca popolo*. 2. *La alsacano* (Log. Alsaco).
- ALTA — 1. *Spekuli pri altiĝo* de prezoj. 2. *Ricevi elpermeson* el hospitalo.
- ALTAR — *Sur*, antaŭ la *altaro*; la ĉefaltaro kaj la flankaj altaroj.
- ALTARIA — *Fari falkoĉason*; por *falkoĉasado*.
- ALTĖIA — *Alteo* (Bot. "altoea").
- ALTERAR — *Ŝangi planojn*, frazojn; *aliformigi* la veston.
- ALTERNADOR — *Alternilo* (Ele.); *alternatoro*.
- ALTERNÂNCIA — *Alternanco* (Ele.).
- ALTERNAR — 1. *La suno kaj la luno alternas* sur la ĉielo. 2. *Alternigi* la virojn kaj virinojn ĉirkaŭ la tablo.
- ALTERNATIVA — 1. *Ne restas alternativo*; antaŭ la *alternativo* silenti aŭ morti. 2. *Fari*, kiel *alternajojn*.
- ALTERNATIVO — *Alterni* movado; kontinua kaj *alterni* kurento; la *alterni* kultivo de la tero.
- ALTIMETRIA — *Altometrio* (Geom.).
- ALTIMETRO — *Altometro*.
- ALTÍSSIMO — *Pregi al la Plejaltulo*.
- ALTISTA — *Haŭsiero* (spekulisto).
- ALTIVEZ — 1. *Malakcepti kun fiero*; malsimpatia pro sia *fiereco*. 2. *Nepravigebla orgojlo*.
- ALTIVO — *Fiera* sinjoro; kun *fiera* rigardo; *fieri* rigardi de supre; esti *fiera* al la subuloj.

ALTO — *Alta* arbo, monto; ŝvebi *alte* en la aero; ĵeti ŝtonon *alten*. 2. *Sur*iri la *supron* de monto. 3. *Laŭta* voco, bruoj; paroli, legi *laŭte*. 4. *Alda* voĉo, violono. 5. *Supra* legado; legi *supra*je. 6. Direktigi al *libera, profunda* maro. 7. Progresi kun *supren*-malsuprenigoj. 8. *Halto* en la marŝo; *haltu!*

ALTO-FALANTE — Paroli per *laŭtparolilo*; instali *publikparolan* sistemon.

ALTO-RELEVO — *Altrelefa* skulptaĵo; skulpti *altreliefe*.

ALTRUISMO — Konduti kun *altruismo*, malegoismo.

ALTRUISTA — *Altruisma* sindediĉo; malegoisma helpo; la *altruisto*.

ALTURA — 1. Longo, larĝo kaj *alto*; havi la *altan* de mil metroj; *alta* mil metrojn; la *alteco* de la monto; infanoj de sama *kresko*. 2. Domo sur *alta*ĵo. 3. *Ortango* de triangulo.

ALUCINAÇÃO — Senti *halucinon*; estigi *halucinon*.

ALUCINADO — *Haluciniginta* menso; *haluciniginte* li faris tion; *halucinita* de la teruro; *halucinite* li agis tiel; la *haluciniginto*; *halucinatoj* ne rezonas; li estas *halucinulo*.

ALUCINANTE — *Halucina* teruro, filmo. 2. Je *halucina* rapido.

ALUCINAR — La teruro *halucinis* lin; *halucinigi* de, pro la teruro.

ALUDIR — *Aludi* (ne rekte paroli) al io, ion; *aludi* al iu, iun; *mentii* la dokumenton.

ALUGAR — *Lui*, *lupreni* domon de iu; *luigi*, *ludoni* domon al iu.

ALUGUEL — 1. Pagi la *luprezon*, *luon* de la domo; interkonsenti pri la *lupago*; la *luprezo* pagendiĝas hodiaŭ. 2. La *luado* de domoj; *luigo* de sia domo al amiko por unu monato; *luaŭtomobilo*.

ALŬMEN — *Aluno* (Kem.).

ALUMINA — *Alumino* (Min.).

ALUMÍNIO — *Aluminio* (Kem.); la *aluminia* klorido.

ALUNO — *Lernanto* en liceo; la *lern-ejanoj*, *kursanoj*.

ALUSÃO — Fari *aludon* al io.

ALUVIAO — *Aluvia* tavolo; terplenigita per *aluvio*.

ALVIADE — *Ceruzo* (plumba oksido); *plumboblanko*.

ALVARÁ — 1. *Jugordono* por io. 2. *Ricevi licencon* por alkoholvendo.

ALVENARIA — La *ĉarpentaĵo* kaj la *masonaĵo* de la konstruo; *masonaĵa* domo; *brikdomo*; fini la *brikaĵon*.

ALVÉOLO — En *alveolo*.

ALVIAO — *Platfosilo*; *hojo*, *plugpioĉo* (por malkompaktigi la grundon).

ALVISSAREIRO — *Ricevi ĝojigan nov-aĵon*.

ALVITRE — Bona *sugesto* por io.

ALVO — 1. *Celtabulo*; movanta *paŝcelo*; trafoj sur la *celdisko*; konkuri ĉampionecon pri *celpafado*. 2. *Trafi* sian *celon*; la *celobjekto*; la *celo* de la intrigoj. 3. *Blanka tuko*, *papero*.

ALVORADA — 1. Je *matenigo*, *tagigo*.

2. *Leviĝo* de la soldatoj; *trumpeti*, klaroni *levigon* por la soldatoj; *veksignalo*, *vektrumpetado* por la soldatoj.

ALVORECER — 1. Nun frue *matenigas*, *tagigas*. 2. Je *matenigo*, *tagigo*, *matenruĝo*, *matengrizo*.

AMA — 1. *Vartistino*, *infanistino*. 2. *Mamnutristino*, *nutristino*. 3. La *mastrino* (de domo, bieno).

AMABILIDADE — 1. *Laŭdi* ies *afablecon*; estas *aminde* fari tion al mi. 2. Dankon pro la *afablaĵo*; fari *afabl-aĵon* al amiko.

AMACIAMENTO — 1. *Supligo* de ledo, ŝuo. 2. *Malrajpigo* de riglilo, *serurlan-go*. 3. *Erodado* de aŭtomobilo.

AMACIAR — 1. *Supligi* ledon, ŝuon. 2. *Malrajpigi* riglilon, *serurlangon*. 3. *Erodi* aŭtomobilon, motoron.

AMADO — *Sia amato*; persono *amata* de ĉiuj.

AMADOR — *Amatora* futbalisto; *amatoro* pri radio; *radioamatoro*.

AMADRINHAR — *Patrinumi* iun.

AMADURECER — 1. La frukto *maturigis*; *maturigi* legomojn per varmigo. 2. La junulo, liaj ideoj *maturigis*.

AMADURECIDO — 1. *Maturiginta* frukto. 2. *Maturiginta* junulo, ideo.

AMADURECIMENTO — 1. *Maturigo* de la fruktoj. 2. *Maturigo* de ideoj.

AMAGO — 1. La *kerno* de la demando; esplori la *koraĵon* de la afero.

AMAINAR — 1. *Kvietigi* la ondojn; la maro *kvietigis*. 2. *Mildigi* la krizon; la krizo *mildigis*.

AMALDIÇOAR — 1. *Malbeni* la filon; *malbeni* la horon, kiam... 3. *Damni* (kondamni je infero) la malamikojn.

AMALGAMAR — *Amalgami* metalon.

AMAMENTAR — *Mamnutri*, *mamsuĉigi* infanon.

AMANHÁ — *Morgaŭ aŭ postmorgaŭ*; ne pensu pri la *morgaŭo*.

AMANHECER — 1. *Matenigi*, *tagigi*; nun *tagigas* je la sesa. 2. La *matenigo*, *tagigo*.

- AMANITA — *Amanito* (Bot. "amani-ta").
- AMANITINA — *Amanitino* (Kem.).
- AMANSAR — *Malsovagiĝi leonon*; lupoj *malsovagiĝas* facile. 2. *Ŝi malsovagiĝis* la diboĉeman junulon. 3. *Dresi ĉevalon* por rajdado.
- AMANTE — 1. *Fervoraj geamantoj*. 2. *Kromedzo, kromviro, amoranto, amisto* de malĉastulino; edzino kun pluraj *amantoj*; *amantino, amdonantino, amajistino*. 3. *La ŝatantoj* de kino, sportoj.
- AMANTEIGAR — 1. *Buteri la panon*, toaston. 2. *Buterigi la kremon*.
- AMAR — 1. *Ami patrinon, edzinon*; *ami Dion* super ĉio. 2. *Amori* (sekse) *virinon*.
- AMARANTO — *Amaranto* (Bot. "amarantus").
- AMARELADO — 1. *Flaveta koloro*. 2. *La flaviginta ĉemizo, kolumo*.
- AMARELAR — 1. *La folioj flavigis*. 2. *La gladilo flavigis la kolumon*.
- AMARELINHA — *Ludi paradizon*; *fari paradizludon*.
- AMARELO — *Flava koloro*; *la flavo*. 2. *La flavhaŭtuloj, flavuloj*.
- AMARGAR — *Absinto estas amara, maldolĉa*. 2. *Maldolĉigi la vivon* per zorgoj.
- AMARGO — 1. *Amara, maldolĉa kiel galo*. 2. *Sensukera kafo*; *maldolĉa mateo*. 2. *Kun amara, maldolĉa sento*.
- AMARGOR — 1. *Amareco de absinto*; *iŭ absinta amaraĵo*. 2. *La amareco de lia vizaĝo*; *la maldolĉeco de la mateo*.
- AMARGURA — 1. *Kun amareco, maldolĉeco de galo*. 2. *La amareco, maldolĉeco de ia vivo*; *vivi kun maldolĉo en la koro*; *vivi ĉe la strato de la senhavuloj*.
- AMARGURAR — *Vi maldolĉigas la vivon* per tiaj zorgoj.
- AMÁRICO — *Amharo* (antikva lingvo); *paroli amhare*.
- AMARÍLIS — *Amarilido* (Bot. "amaryllis").
- AMARRA — *La ŝipo rompis la haŭseron* (fortika ŝnuro plurkordona);
- AMARRAÇÃO — 1. *Alligo de ŝipo al kajo*; *alligo de la veloj*. 2. *Kajmura bolardo* (paliso por alligo de ŝipo).
- AMARRADO — *Ligaĵo de dokumentoj*.
- AMARRAR — 1. *Alligi ĉevalon al fosto*; *ligi hundon per ŝnuro*. 2. *Ligi paketon per ŝnureto*; *ŝnuri la paketon*; *ŝnuri, ŝnurligi kaptiton*; *ŝnuri ies piedojn*; *ĉirkaŭligi brakon per bandaĝo*. 3. *La hundo starfiksas la ĉesajon*. 4. *Laĉi la ŝuojn, korseton*; *laĉebla korseto*.
- AMARROTAR — *Ĉifi la paperon*; *ĉifisian pantalonon*; *necifebla ĉemizo*.
- AMA-SECA — *Vartistino*.
- AMASSAR — 1. *Ĉifi la ĉemizon*. 2. *Knedi paston*; *rulpremi argilon*. 3. *Enpremi, enpuŝi kotŝirmilon de aŭtomobilo*.
- AMAUROSE — *Amaŭrozo* (Med.).
- AMÁVEL — *Afabla* (ĝentila) *amiko*. 2. *Aminda junulino*.
- AMAZONA — 1. *Fabelo pri amazonoj*. 2. *Lerta amazono* (rajdantino).
- AMBIÇÃO — 1. *Ambicio pri mono, gloro, fariĝi riĉa*. 2. *Gloramo de aktoro*.
- AMBICIONAR — *Ambicii gloron*, al gloro.
- AMBICIOSO — 1. *Ambicia avarulo*; *ambicia pri mono, gloro, fariĝi riĉa*; *ambiciulo*. 2. *Glorama aktoro*.
- AMBIDEXTRO — *Ambaŭdekstra viro*; *ambaŭdekstrulo*.
- AMBIENTE — 1. *Medio favora por mikroboj*. 2. *Regis atmosfero de malpaco*; *etoso* (spirita atmosfero) *konvena al nia kampanjo*.
- AMBIGUO — *Ambigua, dusenca, dusignifa esprimo*.
- AMBITO — *En la limoj de mia aŭtoritato*.
- AMBLÍOPE — *Ambliopa* (Med.).
- AMBOM — *Ambono* (preĝeja tribuneno).
- AMBOS — *Per ambaŭ manoj*; *ili estas ambaŭ malpuraj*.
- AMBROSIA — *Ambrozio* (dia manĝaĵo).
- AMBRÓSIA — *Ambrosio* (Bot. "ambrosia").
- AMBULANTE — 1. *Iranta ekspozicio*. 2. *Kolportisto* (vendisto).
- AMBULATÓRIO — 1. *Movebla, iranta hospitalo*. 2. *Ambulatorio de hospitalo*; *ambulatoria* (por neinternigitaj) *kuracejo*.
- AMEAÇA — 1. *Ricevi, fari minacon*, ke... 2. *Sub minaco de mortigo*.
- AMEAÇADOR — *Fari minacan geston*; *kun minacanta rigardo*.
- AMEBA — *Amebo* (Zoo. "amoeba").
- AMEBIASE — *Amebiozo* (Med.).
- AMEDRONTAR — *Timigi iun per minacoj*.
- AMEIA — *Kreneloj en la muro*; *krenela muro*; *krenelaro de la turo*.
- AMEIXA — *Pruno* (Bot. "frukto de prunarbo 'prunus'").
- AMEM — *Diru amen*; *amen!*
- AMENDOA — 1. *Migdalo* (Bot. "amyg-

dalus communis"). 2. *Amando* (kerno de migdalo).

AMENDOADO — *Migdalformaj okuloj*.

AMENDOIRA — *Migdalujo, migdalarbo* (Bot. "prunus amygdallus").

AMENDOIM — *Ternukso, arakido* (Bot. "arachis").

AMENIDADE — *Mildeco de la klimato, de ies karaktero*.

AMENIZAR — *Mildigi punon, esprimon*.

AMENO — *Milda klimato, karaktero*.

AMENORRÉIA — *Amenoreo* (Med.).

AMENTILHO — *Amento* (Bot.; infloresko).

AMERICANIZAR — *Usonigi morojn, modojn*.

AMERICANO — 1. *Amerika Kontinento; amerikano* (log. en la kontinento); *nord-amerika, sud-amerika, centr-amerika lando; nord-amerikano, sud-amerikano, centr-amerikano*. 2. *La Usona Respubliko; la usonano* (log. Usono).

AMÉRÍCIO — *Americio* (Kem.).

AMESTRADO — *Dresita ĉevalo, urso*.

AMESTRAR — *Dresi ĉevalon, urson; dresi hundojn por caso*.

AMETISTA — *Ametisto* (juvelŝtono).

AMETÍSTICO — *Kun ametistaj okuloj*.

AMETROPIA — *Ametropeco* (Med.).

AMÉTROPO — *Ametropaj okuloj*.

ANFITRIÃO — *Amfitriono* (invitinto al bankedo, festeno).

AMIANTO — *Tegi per asbesto* (Min.).

AMIDA — *Amido* (Kem.); *acetamido*.

AMIDO — *Amelo de vegetaĵoj; rigidigi kolumon per amelo*.

AMIEIRO — *Alno* (Bot. "alnus").

AMIGDALA — *Operacii infanon pri tonsiloj, migdalglandoj*.

AMIGDALINA — *Amigdalino* (Kem.).

AMIGDALITE — *Tonsilito* (Med.).

AMISTOSO — *Kun amikigema tono; en amikecaj rilatoj kun iu*.

AMIGO — 1. *Amiko en ĝojo kaj en ploro; sin montri amika al iu; tre amikaj inter si; mi amikas kun ili; antaŭ longe ni amikiĝis; ili estas amikaj najbaroj*. 2. *La ŝatantoj de kino, sportoj*.

AMILA — *Amilo* (Kem.).

AMINA — *Amino* (Kem.).

AMIO — *Amio* (Bot. "ammi majus").

AMÍRIS — *Amirido* (Bot. "amyris").

AMITOSE — *Amitozo* (Fizi.).

AMIZADE — *Amikeco al iu; vivi en amikeco kun ĉiuj; amikeco aparte, ofico aparte*.

AMNÉSIA — *Amnezio* (Fizi.).

AMNIO — *Amnio* (Ana.).

AMOLAÇÃO — 1. *Elteni ies ĝenadon; kia ĝenaĵo!* 2. *Tedado de demandema infano*. 3. *Akrigo de tranĉiloj*.

AMOLADO — 1. *Ĉagrenita de la perdo de tempo*. 2. *Ĝenata de bruemaj knaboj*. 3. *Tedata de tro da demandoj*. 4. *Per akra tranĉilo; akra, tranĉanta kiel razilo; akrigita per ŝtono*.

AMOLADOR — 1. *Akrigilo por tranĉiloj, raziloj*. 2. *Profesia akrigisto*.

AMOLANTE — 1. *Ĝena bruado; senkonsciencia ĝenulo*. 2. *Naiva tedulo*. 3. *Ĉagreniga novaĵo. La akriga surfaco*.

AMOLAR — 1. *Tiu perdo de tempo ĉagrenas min; mi ĉagreniĝis pro lia perfido; tia akuzo incitis lin; ne incitigu pro tio*. 2. *Tia insistu ĝenas min*. 3. *Vi tedas lin per tiom da demandoj*. 4. *Akrigi tranĉilon, razklinton; razrimeno; akrigŝtono*.

AMOLECER — 1. *Moligi vakson; la vakso moligiĝis; plimoligi ledon*. 2. *Moligi, malhardi ies koron, kuraĝon; lia koro, kuraĝo moligiĝis, plimoligiĝis, malhardiĝis*.

AMOMO — *Amomo* (Bot. "amomum").

AMONIACAL — 1. *Amonia klorido; per amoniaj saloj*. 2. *Amoniaĵa solvaĵo: NH₄ OH*.

AMONIACO — *Amoniako* (Kem.; NH₄ OH).

AMÔNIO — *Amonio* (Kem.; radikalo).

AMONITE — *Amonito* (Fos.).

AMONTOADO — *Amaso da objektoj; per amasigo de riĉaĵoj*.

AMONTOAR — 1. *Amasigi objektojn, riĉaĵojn; amasigi pruvojn kontraŭ iu*. 2. *Kunrasti la falintajn foliojn*.

AMOQUE — *Amoko* (Psi.); *li kuris amoke tra la vilaĝo*.

AMOR — 1. *Senti, havi amon al iu; pro memrespekto, memestimo, memamo*. 2. *Ho, amato; kia aminda bebo*. 3. *Pro kristana homano*. 4. *Havi amoron kun malĉastulino; fari amaĵon*.

AMORA — *Moruso* (frukto de morusarbo "morus alba"); *morusbero*.

AMOREIRA — *Morusujo, morusarbo; folioj de morusujo por silkovermoj*.

AMORENAR — *Brunigi la haŭton ĉe la suno, sur la strando*.

AMORFO — *Amorfa amaso*.

AMOROSO — 1. *Amema patro; amerigardi la filon*. 2. *Havi amajn rilatojn*.

AMOR-PERFEITO — *Penseo* (Bot.), *trikoloreto*.